



# ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO (ELI)  
P.K. 39004, TEL AVIVO  
N-ro 67 - FEBRUARO 1979

האספרנטיסט הישראלי



בסאון תליגה לאספרנטו בישראל

ת.ד. 39004, תל-אביב

העורך: אלכסנדר מנור

חוברת 67-פברואר 1979

## ENHAVO

Golda Meir	A. Manor	1.
Zamenhof pri judaismo kaj cionismo		4.
Miaj rememoroj	N. Drezner	6.
El la Predikanto	trad. J. Kohen Cedek	9.
La E-o Movado: pasinteco kaj estonteco	A. Vandel.	10.
Januŝ Korĉak	M. Landaŭ	12.
Melodioj	J. Giladi	14.
Kongreso de teknologiaj novigantoj	H. Maŝler	15.
Apologio de grafologino	R. Ŝaĥar	16.
Angulo de J.E.L.I.	E. Zalcman	17.
Pensoj	I. Zak	18.
El nia agado kaj movado		19.



# ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO  
EN ISRAELO

P.K. 39004, Tel Avivo  
N-ro 67 - Februaro 1979

Ĉefredaktoro  
Aleksander Manor

Redaktoro:  
Josef Semer



## GOLDA MEIR

(3.5.1898 - 8.12, 1978)

"Esti Judo signifas esti fiera pri aparteno al popolo, kiu gardis sian specifan identecon pli ol 2000 jarojn, spite la dolorojn kaj suferojn kaŭzitajn al ĝi".

Golda Meir

G.M. naskiĝis en Kievo, la ĉefurbo de Ukrainio. Ŝia patro Maboviĉ estis lignaĵisto. La familio membris 8 infanojn de kiuj restis nur 3 filinoj. La patro forveturis al Usono kaj en la jaro 1906 venigis la tutan familion. Golda finis la gimnazion en Milvokio kaj studadis en seminario por instruistoj. Poste ŝi instruis en popollernejoj. Ŝi aliĝis al la juda laborista partio "Poalej-Cion" kaj estis tre aktiva. En la jaro 1917 ŝi edziniĝis. En majo 1921 ŝi venis al Israellando kaj vivis kun sia edzo Moris Meirson du jarojn en la kibuco Merhavja. En la jaro 1923 ili forlasis la kibucon kaj translokiĝis al Tel Avivo. En 1928 ŝi fariĝis sekretariino de la laboristinoj en la "Histadrut". En 1932 ŝi estis sendita al Usono por gvidi la virinan laboristan organizaĵon "Pioneer Women". En 1934 ŝi revenis al Israellando kaj estis membrino de la ekzekutivo de "Histadrut". Ŝi gvidis la departamenton de profesiaj organizaĵoj. En jaro 1940 ŝi gvidis la politikan departamenton de "Histadrut" (La ĝenerala organizaĵo de laboristoj en Israellando). En 1946 ŝi estis elektita al la ekzekutivo de la cionista organizaĵo. En novembro 1947 kaj en majo 1948 ŝi renkontiĝis dufoje kun la reĝo de Jordanio Abdalla por konvinki lin ne kontraŭstari kaj batali kontraŭ la fondiĝo de la juda ŝtato. La reĝo

diris al ŝi: "Mi tre miras pri via rapideco establi la judan ŝtaton". Tiam G. respondis: "Ĉu vi opinias, ke atendado de 2000 jaroj signifas rapidecon?". En junio 1948, post la establiĝo de Israelo, ŝi estis sendita al Usono por kolekti la monon por la novfondita ŝtato.

Ben-Gurion, ĉefministro de Israelo poste proklamis: "se oni skribos la historion de Israelo, oni rakontos pri unu juda virino, kiu kolektis la necesan monon, por ke Israelo povu ekzisti dum siaj unuaj paŝoj".

De Usono ŝi estis sendita, kiel ambasadorino de Israelo al Moskvo. En 1949, post la unuaj elektoj de la israela parlamento (kneset), ŝi estis elektita al la unua israela registaro kiel laborministrino. 7 jarojn ŝi plenumis tiun funkcion (1949-1956). Tiam estis la tempo de la plej granda enmigrado al Israelo.

En junio 1956 ŝi fariĝis ministrino por eksteraj aferoj. Tiun funkcion ŝi plenumis dek jarojn ĝis januaro 1966. Poste ŝi estis sekretariino de la laborista partio. En marto 1969 ŝi estis elektita kiel ĉefministriino de Israelo. Tiun ĉi funkcion ŝi plenumis kvin jarojn ĝis junio 1974, kiam ŝi estis jam 76-jara.

En la konsolletero, kiun sendis la prezidento de Egiptio Sadat al la prezidento de Israelo I. Navon, li skribis: "En la tempo en kiu ni laboras por atingi pacon por ĉiuj loĝantoj de nia areo mi devas konstati, ke G.M. plenumis gravan taskon por komenci la laboron por la paco, kiam ŝi subskribis la unuan konvencion por disigi la fortojn inter Israelo kaj Egiptio en 1974. Ŝi estis gvidantino de la unua vico kaj ŝi meritas okupi sian lokon en via historio."

Ankaŭ prof. H. Kissinger, la antaŭa usona ministro por eksteraj aferoj, ne ĉesis glorigi ŝin. Post la "Jom Kipur" milito (Oktoobra milito 1973) inter Israelo kaj la arabaj ŝtatoj, kiam Usono malhelpis al Israelo atingi decidan venkon, diskutis kaj traktis G.M. kun Kissinger pri la apartigo de la fortoj. Kissinger estis tre severa kaj donis tre severajn kondiĉojn por Israelo. Sed G.M. ne timis kaj ne cedis. Ŝi diris, ke li ne estas la lasta instanco kaj se li kontraŭstaros, ŝi povas turni sin al la prezidento de Usono. Kissinger moliĝis iomete kaj diris: "Sadat la prezidento de Egiptio neniam akceptos viajn postulojn kaj ni neniam atingos." G.M. ne akceptis lian opinion kaj diris, ke li ne reprezentas prez. Sadat kaj li devas transdoni ŝiajn kondiĉojn al li. Post la subskribo de la konvencio Kissinger diris al ŝi: "Mi promesas al vi ke de nun mi neniam diros, ke kion vi postulas ne estas atingebla".

Kiel politikistino ŝi agis kontraŭ ĉiuj reguloj de la profesia diplomatio, ĉar ŝia simpla vivkonduo kaj ŝiaj vortoj kaj paroladoj estis simplaj kaj veraj. Homoj kaj diplomatoj povis kontraŭstari ŝin, sed ili ĉiam sentis, ke ŝi esprimas sian veran opinion kaj ne estas duflankeca. Ŝi diris senhezite tion je kio ŝi kredis. Ŝi komencis sian vivon en Israellando en kibuco kaj tio ankaŭ atestas pri ŝia senhezita kredo kaj idealismo. Dank' al similaj al ŝi pioniroj establiĝis la ŝtato Israelo. Tiu kredo kaj justeco de ŝia vojo donis al ŝi fortojn per kiuj ŝi ankaŭ venkis sian malsanon.

Ŝi apartenas al la tri plej grandaj judaj gvidantoj: Weizmann, Ben-Gurion kaj ŝi. Ne nur la juda popolo sed aliaj nacioj en la vasta mondo agnoskas tion, sed inter ili G.M. estas la plej popola nacia gvidantino. Ben-Gurion kaj Weizmann estis adorataj, ŝi estis ankaŭ amata de la vastaj vicoj de la popolo en Israelo kaj en diasporo. Ĉiujare kiam oni elektis en Usono la 10 plej famajn virinojn en la mondo, G.M. ĉiam komencis la liston de la elektitoj.

G.M. diris, ke la plej belaj jaroj en sia vivo estis kiam ŝi estis laborministrino (1949-1956). Tiuj estis la plej malfacilaj jaroj por Israelo. Tiuj estis la jaroj de amasemigrado kaj ŝi devis zorgi por loĝejoj kaj por la laborlokoj por centmiloj da homoj. Ne ĉiu gvidanto povas elteni simile streĉigajn kaj decidigajn jarojn. G.M. staris tiam kiel firma roko inter la ŝtormaj ondoj de la homa mizero kaj malfeliĉo. Kaj tia ŝi estis dum la Jom-Kipur milito, kiam ŝi devis decidi pri gravaj strategiaj paŝoj.

A. Manor



ZAMENHOF PRI JUDAISMO KAJ CIONISMO

Ekstrakto el letero de L.L. Zamenhof al A. Michaux, 1905  
(Citaĵo de: G. Waringhien: Leteroj de L.L. Zamenhof).

Pri mia interna batalado kaj pri miaj idealoj mi volus kaj povus rakonti al vi tre multe. Sed se, kiel mi jam diris, por estontaj generacioj mia rakonto eble havus kelkan intereson - por la nuntempa generacio tiu ĉi rakonto estus tute ne oportuna. Ĉar tuj en la komenco de mia rakonto mi devus necese raportti, ke mi estas hebreo kaj ĉiuj miaj idealoj, iliaj naskiĝo, maturiĝado kaj obstineco, la tuta historio de miaj konstantaj bataladoj internaj kaj eksteraj - ĉiuj estas sendisige ligitaj kun tiu ĉi mia hebreeco. Mi neniam kaŝis mian hebrecon kaj ĉiuj e-istoj tion ĉi scias; mi kun fiereco alkalkulas min al tiu ĉi tiel antikva kaj tiom multe suferinta kaj batalinta popolo, kies tuta historia misio konsistas, laŭ mia opinio, en unuigo de la nacioj en la celado al "unu Dio", t.e. unuj idealoj por la tuta homaro; sed en la nuna tempo de la naciaj ŝovinismoj kaj vastigita antisemitismo, fari el mia hebreeco temon por publika parolado estus neoportuna kaj povus malutili al nia afero. Kaj paroli detale pri mia vivo kaj pri la historio de miaj ideoj sen konstanta ripetado pri mia hebreeco estus preskaŭ neeble.

Se mi ne estus hebreo el la getto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo. La malfeliĉon de la homara disiĝo neniuj povas senti tiel forte kiel hebreo el la getto. La neceseco de la lingvo sennacia, neŭtrale homa, neniuj povas senti tiel forte, kiel hebreo... kiu estas devigata preĝi al Dio en la jam longe mortinta lingvo, ricevas sian edukadon kaj instruadon en lingvo de popolo, kiu lin forpuŝas, havas sam-suferantojn en la tuta mondo kaj ne povas kun ili kompreniĝadi... Mi havas nun nek tempon, nek paciencon por detale klarigi al vi la situacion de la rusaj hebreoj, kaj la influon de tiu ĉi situacio sur mian tutan celadon kaj bataladon. Mi nur simple diros al vi, ke mia hebreeco estis ĉefa kaŭzo, kial mi de la plej frua infaneco fordonis min tutan al unu ĉefa ideo kaj revo - al la revo pri la unuigo de la homaro.

Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj la celo de mia tuta vivo, la afero esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo - pri la tuta cetera parto mi ne ĉesas pensi kaj revii...

Se mi ne estus hebreo, tiam mi povus min fordoni al mia revo tute kaj absolute; sed ĉar mi apartenas al popolo, kiu tiom multe suferadis kaj plej parte ankoraŭ nun terure suferas (precipe en Rusujo, kie la konstantaj ĝemoj de mia malfeliĉa, terure premegata kaj kalumniata popolo, venenas al mi la vivon), tial tre ofte turmentadis min la penso, ke mi ne havas la moralan rajton laboradi por idealoj neŭtrale homaj, kiam mia popolo tiom

multe suferas kaj havas por si tiom malmulte da batalantoj. Krom tio mi ofte ripetadis al mi: "Kiam hebreo laboras por la unuigado de la homaro, oni nur mokados kaj atakados lin, oni diras, ke li faras tion ĉi nur el egoismo, por depreni de la pli feliĉaj nacioj tiujn privilegiojn, kiujn ili havas en komparo kun la malfeliĉa kaj ĉie persekutata hebrearo. Fortigu la situacion de via propra popolo, donu al via popolo landon, lingvon kaj gloron, kaj nur tiam vi havos la rajton paroli pri unuigado de la popoloj, tiel same kiel pri socialaj reformoj povas sukcese paroli nur riĉulo, kiu ofertas, sed ne malriĉulo, kiu postulas." Ĉiufoje kiam tiuj pensoj min atakadis, en mi vekigadis ambicio pri mia ĉiam persekutata kaj en ĉiuj rilatoj malfeliĉa popolo kaj mi (pro amo al mia ĉefa idealo mem) fariĝadis patrioto de mia popolo. Longan tempon en mia juneco mi estis varmega "sionisto" (tiam la sionismo ne estis ankoraŭ en modo, mi estis unu el la unuaj pioniroj de tiu ĉi ideo kaj tiam miaj sampopolanoj forte mokadis min, kiam mi kun juna flameco kaj profunda kredo paroladis al ili pri la rekonstruo de la Palestina hebrea regno). Mi laboris energie por tiu ideo, mi fondis sukcese la unuajn grupojn sionistajn. (Post 3-4 jaroj de energia laborado por sionismo mi venis al konvinko, ke tiu ĉi ideo kondukos al nenia celo kaj tial mi forĵetis tiun ĉi ideon, kvankam en la koro ĝi restis por mi ĉiam kara, kie el agrabla sed neplenumebla revo; kiam en 1897 naskiĝis la granda sionista movado aranĝita de Herzl, mi jam ne povis aliĝi al ĝi). Sed eĉ tiam, kiam mi estis flama sionisto, mi neniam ĉesis revadi kaj laboradi por la ĉefa mia ideo (unuigo de la homaro). Mi esperis, ke kiam mia popolo akiros iam sian antikvan hejmon kaj feliĉecon, ĝi plenumos kun sukceso tiun sian historian mision, pri kiu revis Moseo kaj Kristo, kaj vole-nevole ĝi devos fondi popolon kaj landon idean, neŭtrale homan kun neŭtrala sennanta lingvo kaj neŭtrale-homa filozofie-pura religio, kaj plenumiĝos la vortoj de Biblio, ke ĉiuj popoloj venados Jeruzalemon por adoradi la unu kaj solan "Dion" kaj Jeruzalemo fariĝos centro, kiu frate unuigos la tutan homaron...

Ĉar la pli granda parto de nia popolo (precipe en Rusujo) ne uzas la lokajn lingvojn, sed parolas per aparta "ĵargono" hebrea-germana (la tiel nomata "yiddisch"), kiu ĝis nun ankoraŭ posedas nenian gramatikon, tial mi antaŭ longatempem dediĉis ĉirkaŭ 2 jarojn al la fundamenta esplorado de tiu ĵargono, mi esploris ĉiujn ĝiajn leĝojn kaj mi ellaboris ĝian gramatikon (kiun mi tamen neniam publikigis). Poste mi tamen forĵetis tiun ĉi laboradon, ĉar mi opiniis, ke la vekado de la kvazaŭ-nacia patriotismo ĉe la hebreoj povus esti malutila por ili mem kaj por la ideo de unuigo de la homaro.

Sendis A. Ŝalamon



MIAJ REMEMOROJ

Miaj ĉiutagaj okupoj malebligas al mi rememori ĉiujn esperantajn entreprenojn okazintajn inter la verduloj ek de mia alveno landen; finfine jam pli ol 44 jaroj estas malantaŭ mi. Tamen mi prezentos ĉi tie kelkajn erojn de la historio de nia movado.

Dum la jaro 1933, la saman tagon de mia alveno mi kiel Esperantisto interkonatiĝis kun s-ro advokato Heruti, pere de kiu mi eksciis pri la ekzistantaj Esp. grupoj - en Jerusalemo, Tel Avivo kaj Hajfo - kaj pri individuaj samideanoj en vilaĝoj kaj kibucoj. Memkompreneble mi tuj aliĝis al la tel-aviva grupo por kune agi. Kvankam la novvenintoj unue devas lerni sian nacian lingvon Ivrit (hebrea), mi ne deflankiĝis de la Zamenhofa Lingvo.

La Landajn Konferencojn ĉiam partoprenis, krom la oficialaj ekzistantaj grupoj, ankaŭ la individuoj.

Antaŭ mi kuŝas diversaj fotoj de la tiama tempo, kiuj fakte helpas al mia rememoro.

Jen! Dum la Landa Jarkonferenco en 1934, kiu okazis en Jerusalemo, oni festis la sesdekjaran datrevenon de naskiĝtago de la neforgesebla pioniro N.B. Havkin. Vere la konferenco havis festan aspekton. Dum la jaro 1936 oni inaŭguris en Tel Avivo Zamenhof-straton. En la ceremonio partoprenis konata Esperantisto, kiu venis kiel ĵurnalisto de la pola gazeto "Nasz Przegląd", s-ro Oskar Berman. Por ni, la tel-avivaj esperantistoj, estis ĝi granda atingo kaj ĝojo, vidante kiel la tiama urbestro s-ro M. Dizengof tratondis la verdan rubandon.

Esperantistoj vizitantaj Israelon povas facile trovi la straton, troviĝantan en la centro de la urbo apud Dizengof strato. Sur la unua domo de Zamenhof str. troviĝas esperantlingva surskribo: d-ro L.L. Zamenhof KREINTO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO.

Kursoj de Esperanto ĉiam kaj ĉie okazis. En Jerusalemo gvidis ilin s-anoj E. Bor kaj O. Kuk; en Hajfo - J. Armoni kaj en Tel Avivo - la skribinto de ĉi linioj.

La kursoj okazis dank' al s-roj Heruti kaj Gorodiski, kiuj bonvole transdonis siajn oficejojn por la instruado.

Dum la jaroj 38-39 aperis nova disĉiplo, s-ano Ŝtamper, kiu prizorgis ejon por la tel-aviva grupo por konstantaj renkontiĝoj kaj li mem gvidis kurson en lernejo Geula.

Dum la dua mondmilito (39-45) certe suferis multaj kulturaj entreprenoj, inter ili ankaŭ Esperanto-Movado en nia lando, sed dank' al sindonemaj s-anoj neniam estingiĝis la agado.

Dum la menciita milito ni ofte gastigis soldatojn-Esperantistojn de diversaj naciaj grupoj tramarsantaj la landon por militi kontraŭ la hitlera armeo. Ni esperas, ke la skribitaj vortoj atingos ilin kaj memorigos pri la gastameco, por denove viziti nin, sed nun kiel pachtalantoj.

La Landan Konferencon 1942 partoprenis tri egiptaj s-anoj kaj ĉeĥa oficiro. Mi ne preterlasos la Universalan kongreson en Svisujo, 1947. Partoprenis ĝin de nia lando 30 ges-anoj. Ĝi fakte estis forta puŝo por nia Movado.

Post la fondiĝo de la Israela Stato (1948) la Esperanto-Movado ricevis alian karakteron. Novaj homaj fortoj plivigligis la Movadon. La Asocio sub la nomo Esperanto-Ligo en Israelo (E.L.I.) komencis funkcii, kvankam ni kunvenis en privata ĉambro, tamen la anaro sentis sin kiel en Esperantujo kaj interesaj prelegoj ĉiam okazis. Indas substreki, ke Universalan Kongreson en Parizo, 1950, reprezentanto de la juna Stato jam oficiale partoprenis. Se mi ne eraras, ELI-anoj ĝis nun ne forestis eĉ unu Universalan Kongreson.

Dum la jaro 1967 devis okazi U.K. en nia lando. Ĉio jam estis preparita kaj prizorgita. La Kongresa Komitato seninterrompe laboris por ĝia sukceso, sed la sorto diktis alie. Sendube, bedaŭras la aliĝintoj; des pli suferis la israelaj Esperantistoj, ĉefe la komitato, kiu deziris enbrakigi la tutmondan esperantistaron. Ni esperu post nelonge efektiviĝi la sopiron. Dum la sama jaro la junulo M. Ben Porat intensive komencis agi por organizi junularan grupon, kiu ekzistas kaj prosperas ĝis nun. Ne atentante la situacion en nia regiono ni penadas daŭrigi nian laboron. En Tel Avivo kaj la ĉirkaŭaĵo oni gvidas esp. kursojn seninterrompe. La instruistoj estas d-ro Mašler, J. Giladi, J. Murĵan, A. Ron, D. Vunderbaum kaj aliaj. Funkcias ankaŭ kurso per korespondado, kiun gvidas J. Semer. Nia membraro konstante kunvenas en la domo Jad-Lebanim en Tel Avivo. La Asocio ĉiam eldonis kaj eldonas esp. bultenon, antaŭ nelonge NIA LIGILO; laste la nomo estas ŝanĝita al ISRAELA ESPERANTISTO. La antaŭaj redaktoroj estis s-ano Fajnblium, pli poste Ben Alter kaj s-anino Dratver kaj la nuna redaktoro estas s-ano Manor, kiu estas ankaŭ la prezidanto de la socio.

Mi permesas al mi memori 3 nomojn, kiuj estis agemaj inter ni dum sia vivo: D. Engelšer. J. Gureviĉ kaj B. Svarzenski.

Pro sindonemo ili postlasis testamenton, kiu instrukcias monan helpon al la loka Asocio kaj al U.E.A. por plivastigi la esp. movadon. Honoron al ilia memoro.

N. Drezner



8.



9.

E L LA P R E D I K A N T O

Ĉapitro I-a; versoj: 1-12.

Kohelet\* - קוהלת

Verse tradukis J. Kohen-Cedek.

- |  |  |
|--|--|
| <p>1. Instru' jen sen dilemo,<br/>De Predikanto - ido,<br/>En urb' Jerusalemo,<br/>De granda reĝ', Davido:</p> <p>2. Vantaĵo kaj vanteco,-<br/>Konstatis Predikanto:<br/>La viv' de l' homa speco<br/>Surtere, estas vanto!</p> <p>3. Rezulte, penlaboro<br/>De l' hom', sub sun', en ŝvito,<br/>Farata kun fervoro,<br/>Restadas sen profito.</p> <p>4. Alternas sur la tero<br/>Funkci' de rotacioj:<br/>Aper' kaj malapero<br/>De homgeneracioj.</p> <p>5. Ĉiela sun' konstante<br/>Subiras kaj leviĝas;<br/>Ĝi ĉirkaŭ tero vante<br/>Kaj vane rondturniĝas.</p> <p>6. Al suda rand', el norda,<br/>Alfluge venas vento;<br/>En ronda pas', laŭorda,<br/>Sen cel', sur firmamento.</p> <p>7. Enfluas la riveroj<br/>En maron, sen sin digi,<br/>Sen pov' per ondliveroj<br/>Ĝin tamen, tutplenigi.</p> <p>8. Ĥaciĝas pro enuo,<br/>Ĝis manko de l' esprimo,<br/>Funkcia kontinuo<br/>De l' monda krekutimo.</p> <p>Sed la okul' avide<br/>Absorbi ĉion volas,<br/>Observ' de l' mondo, vide,<br/>Ĝin plaĉe alparolas.</p> <p>La vanta son-persvado<br/>Orelon aŭdi tentas,<br/>Inklina al aŭdado<br/>Ĝi sen satig' atentas.</p> | <p>9. Sed kio estis - estas,<br/>Kaj estos temp-alterne;<br/>Sen ŝanĝ' mondkreo restas<br/>Kaj restos ĝi eterne.</p> <p>10. Novaĵoj sub la suno<br/>Okazas neniam;<br/>La stato de la nuno<br/>Por ĉiam restos same.</p> <p>11. Se iu ajn konstatas:<br/>- Jen novevento, fakte!-<br/>Delonge jam ĝi statas,<br/>De praa temp', ekzakte.</p> <p>Ne restis jam memoroj<br/>Pri niaj antaŭuloj;<br/>Pri nia viv' kaj moroj<br/>Ne scios posteuloj.</p> <p>Kaj forgesiĝos scioj<br/>Eĉ pri l' venonta vivo,<br/>De la generacioj<br/>Dronontaj en temp -drivo!...</p> <p>* <u>Aldono de la Redakcio:</u><br/>La Predikanto ("Kohelet")-<br/>nomo de unu el la 5 skrib-<br/>rulaĵoj ("Megilot") en la<br/>Biblio, entenanta saĝmedi-<br/>tojn, sufiĉe pesimismajn, de<br/>homo, kiu serĉas respondon<br/>al la demando pri la celo<br/>de la homa vivo, kiu estas<br/>plena da suferoj kaj ĉag-<br/>reno. Laŭ la tradicio -ver-<br/>kita de la reĝo Salomono<br/>("Kohelet"), filo de David.</p> |
|--|--|



LA ESPERANTO-MOVADO: PASINTECO KAJ ESTONTECOaŭ : ĈU STAGNAS LA MOVADO?

Lastatempe mi legis malnovan numeron de "Israela Esperantisto" (tiam "Nia Ligilo", n-ro 29). Trafoliumante mi trovis artikolon, kiu rakontis pri la historio de la Esperanto-Movado en nia lando de post la komenco de la jarcento. Mi malkovris nostalgiajn rakontojn: ĉu vi scias, ke ekzistis en tiama Palestino, jam antaŭ la milito, tutlanda organizaĵo (PEL) kun fortaj aktivaj grupoj en Tel Avivo kaj en Jerusalemo? (kie estas la Jerusalema grupo nun?) Ke okazis jarkunvenoj kun pli ol cent partoprenantoj, kaj eĉ kongreso de la tuta Levanto, kun partoprenantoj de Egiptio kaj de Libano? (ĉu la landkonferencojn nuntempe partoprenas pli ol cent samideanoj?)

Kaj denove mi frontis la dubojn kiuj (eble profunde kaj kaŝe) ĝenas plurajnel ni: ĉu nia vojo estas ĝusta? Ĉu per ĝi ni iam "atingos la celon en gloro?" La saman demandon mi demandas min, kiam mi komparas la historion de la tutmonda Esp. movado kun la nuntempa situacio. Neniu esenca ŝanĝo: apenaŭ kvalita, sed certe ne kvanta. Neniu grandioza kresko, eble eĉ retreto.

Ĉar la E. movado perdis la impulson de siaj unuaj jaroj, kiam miloj da novaj entuziasmaj adeptoj aligis al la nova promesanta ideo. Nuntempe, 90 jarojn post ĝia naskiĝo, la lingvo estas pli matura, sed la ideo - maljuniĝinta. Nia mondo ŝanĝiĝis: ĝi iĝis pli (eble tro...) efikema, realeca, materialeca. Tro realeca por amase akcepti la pioniran ideon de artefarita (jes!) lingvo por tutmonda internacia komunikado. La fakto ke E. ekzistas jam preskaŭ cent jarojn kaj ankoraŭ ne realigis sian celon, ne helpas al nia informado kaj foje vekas skeptikajn reagojn. Ni troviĝas en senfina cirklo: se E. ne fariĝos sufiĉe parolata lingvo, ĝi ne aspektos lerninda al la vasta publiko, kaj se tiu publiko kaj la ŝtataj instancoj ne ekuzos E-on, ĝi ne fariĝos vaste, internacie uzata.

Tiu kritiko, sen propono de solvo, ne estas krea sed detrua kaj ne tion mi intencis. Sed proponi solvon, se ĝi entute ekzistas, ne estas simpla tasko. Solvoj jam amase aperis antaŭe senehe kaj senefike. Kion mi povas novigi? Sed mi pensas ke plej gravan mesaĝon mi jam ellasis. Tiujn vortojn, kiujn vi supre legis, oni ne ofte aŭdacas esprimi kaj malpli ofte - publikigi. Tamen mi dubas, ĉu iu povos sincere kontraŭi ilin. Ili reprezentas esencan fakton, kiun nenio, krom eble la estonteco, povos ŝanĝi aŭ ornamati. Kion mi jes povas fari estas atentigi.

Atentigi, ke ni ankoraŭ estas malproksimaj de la celo. Ke la situacio ne estas kontentiga, nek rapide progresanta. Ke sur la skalo de la ekstera mondo, la laboro farita kaj farata estas preskaŭ ĉiam rutina, liliputa, grizeca. Preskaŭ neniam io grandioza, kies influo atingos ankaŭ ekster nia fermita rondo. Al la nuna agado ĝenerale mankas

entuziasmo, inĝenieco kaj originaleco. La esenco de la nuna agado estas konservi la ekzistantajn atingojn; ĝi estas ĉefe direktita al la E-istoj, anstataŭ al la ekstera mondo. Kaj eĉ la ekzistantan potencialon oni ofte ankoraŭ malgrandigas per vanaj kvereloj.

La solvon, ĉiu el ni devas ellabori mem, de sia sperto, en siaj medio kaj nivelo. Sed se vi tamen deziras koncize scii en kiu direkto mi vidas la solvon - ni devas dividi nian laboron inter du kampoj: ekstera informado kaj edukado de daŭrigantoj. En la unua kampo ni investu la plimultajn penojn: efika, profesia, science bazita informado pri E. kaj la solvon, kiun ni ofertas al la lingva problemo, en ĉiuj atingeblaj medioj: de lokaj gazetoj ĝis ŝtatestroj. Ĉar nur tio donas al ni ŝancon iam efektiviĝi la ideon de internacia lingvo, kaj por ke ĝis tiam ne estingiĝu la flamo, ni ne neglektu ankaŭ la duan kampon, nome la instruadon kaj la konservadon.

Eble tiuj lastaj frazoj ŝajnas al vi banalaj - sed mi ja avertis vin, ke pri solvo mi ne povos multon novigi...

A. Wandel

Daŭrigo en la venonta numero.



Reagoj de legantoj al la artikolo de J. Giladi, "Niaj Universalaj Kongresoj", aperinta en I.E. N-ro 66.

Mi pensas, ke s-ano Giladi pravas nur ĝis la punkto, en kiu li parolas pri lernado de la kongreslanda lingvo. Mi ne konsentas, ke tio estas superflua. Unue, ĉar E. ne intencas anstataŭi la naciajn lingvojn, kies intereso kaj graveco restas ĉiurilate. Malgraŭ oni ne multon povas atingi dum 8 tagoj, tamen ĝeneralan nocion pri la loka lingvo oni povas akiri kaj tio-ĉi gravas por ĉiu homo, kiu havas inklinon al studado de lingvoj kaj kiu ŝatas lerni ion novan kaj eble poste memstare konatiĝi kun la trezoroj de la nacia lingvo. Tio ja ankaŭ signifas ricevon de ideoj pri historio, literaturo kaj aliaj aspektoj de la popolo.

Mi ekzemple, tre volus, ke kiam la Universala Kongreso okazos en Israelo, tiam multe da E-istoj lernu nian belan lingvon en kiu estas skribita la Biblio.

I. Dektor-Ginsburg









## MELODIOJ ("NIGUNIM")

Melodiojn vi plantis en koro ĉe mi  
Gepatroj per digno, per am'  
La grajnoj ekĝermis kaj kreskis en ĝi  
La sonoj, la tonoj, la gam'.

Dum ĉiu tag' pulsas ili kun la sang'  
Radikitaj en la vejnoj, en la kor'  
Zumas ili en mi, ripetas ilin ankaŭ mia lang',  
Restas ĉiam en mia memor'.

Fanja Bergstejn (1908-1950)  
elhebreigis: J. Giladi

## NIGUNIM

(FANIA)

## נגונים

(פניה)

לא לאם אך בדבקות

שֶׁ-טַל - תֵּם - נִי-גוּ - נִים בִּי אֶ-מִי אֶ-וִי נִי-גוּ

SHE-TAL - TEM NI-GU - NIM BI I - MI VE - A - VI NI - GU -

נִים מִזְמוֹרֵי רִים כֹּחַ שֶׁ-חַיִּים עֵי-גַלְגַּל נִים עֵי-גַלְגַּל נִים וְשֵׁן

NIM MIZ'MO - RIM SHE'CHU - CHIM GART - NIM GAR' I - NIM NI - SA -

אֵם לְ-וָי אֶ-וִי עַל-הָהָם לִים לִים זֶם נִים עֵי-גַלְגַּל נִים אֶ-

AM LE - VA - VI A - TA HEIM O - LIM VE - TSOM - CHIM A -

תָּה שׁוֹלְהֵם קִים פֶּה רוּחַ בֶּה - דָּמִי הֵם שִׁי-שֶׁן הֵם עוֹרֵב

TA HEIM SHOL - CHIM PO - ROT BE - DA - MI SHOR'SHEI' - HEM BE'OR -

קִים לֵל-שֶׁן קִים נִי-גוּ אֶ-וִי אֶ-וִי אֶ-וִי אֶ-וִי אֶ-וִי אֶ-וִי אֶ-וִי אֶ-וִי אֶ-וִי

KAI SHE'LU - VIM NI - GU - NE - CHA A - VI VE - SHI - RA - YIC I -

קִים בֵּדוֹף קִים נִי-גוּ רִים וְשֵׁן שֵׁן שֵׁן שֵׁן שֵׁן שֵׁן שֵׁן שֵׁן שֵׁן

MI BE'DOF - KI NE - O - RIM VE - SHA - - - - - RIM

## KONGRESO DE TEKNOLOGIAJ NOVICANTOJ

Israelo havas relative pli multe da sciencistoj ol iu alia simile granda, evoluinta lando. Nuntempe laboras en Israelo en diversaj sekcioj de la scienca teknologio kaj medicino pli ol 5000 esplorantoj, sciencistoj, novigantoj kaj inventistoj. Kongreso de supre menciitaj profesianoj havas nun lokon en Jerusalemo.

Tiu scienca potencialo ne estis ekspluatata ĝis la jaro 1973. De tiam komenciĝis tre vigla evoluo en tiu direkto. Antaŭe multaj sciencistoj ne uzitaj en nia lando devis ĝin forlasi, por trovi laboron eksterlande. La rezultoj de tiu evoluo estas jam tre signifaj. Oni povas mezurigi la rezultojn komparante ne nur la nombron de la sciencistoj, sed ankaŭ la kvanton de evoluigitaj en Israelo novaj aŭ plibonigitaj produktaĵoj, la nombron de la entreprenoj, kiuj ekspluatas teknologie tiujn inventojn aŭ plibonigojn kaj fine la monon, kiu enfluas Israelon per eksportado de tiuj novaĵoj. Ankaŭ la nombro de novaj laborlokoj por intelektuloj kreskanta, montras pri la sukceso de tiu tendenco.

La evoluo, kiel menciite, estas tre vigla. Se en la jaro 1973 oni establis 15 entreprenojn, kiuj uzis tiujn eltrovaĵojn por teknologia produktado, en la jaro 1977 estis jam 80 similaj entreprenoj kaj nun 94. (Oni devas prikalkuli, ke pasas longa tempo de la eltrovo, ĝis kiam ĝi povas esti uzata, do ni esperas, ke en proksima tempo la kresko de tiu procezo estos pli rapida). La eksporto de tiuj varoj kreskis de nulo en la jaro 1973, ĝis 550 milionoj da usonaj dolaroj. Ĉiujare la kresko atingas 30% kaj se tiu kresko ne malgrandiĝos, en la jaro 1986 ĝi atingos 2 miliardojn da dolaroj. Tiu kresko postulas senĉesan alfluron de novaj sciencistoj al nia teknologio (ĉirkaŭ 25% jare), kaj ĝi kreas tre interesan branĉon de la teknologio, en kiu oni ne bezonas fizikajn laboristojn.

Al la branĉoj, en kiuj nia evoluo iras speciale rapide apartenas la produktado de la medicinaj instrumentoj, senŝaligo de la mara akvo, uzo de la suna energio, uzo de la Laser radioj, produktado de medikamentoj, kemiaj produktoj kaj uzo de ultra mallongaj ondoj por la diagnozo.

Ne estas eble raportoj pri ĉiuj flankoj de tiu procezo, ĉar ĝi postulus sciencaĵlibron, ne artikoleon, sed tiu mallonga sciigo aludas nur pri la nova tendenco en la israela socio.

H. Mašler



APOLOGIO DE GRAFOLOGINO

Kiel amuze povus esti, se ni ĉiuj scius iom da grafologio! Ekzemple imagu, ke vi ricevas leteron de nekonnata persono. Vi simple legas la leteron kaj post du minutoj de trarigardo de la manskribo, vi povas diveni al kiu homkategorio li apartenas!

Sciencepruvita kaj akceptita, kiel faka temo en multaj universitatoj en la mondo, la grafologio estas unu el la helpiloj por ekzameni la karakteron de la persono. La instruisto povas uzi ĝin por pli bone ekkoni siajn lernantojn kaj grandaj kompanioj povas elekti novajn laborantojn laŭ la manskribo. La vera grafologo, kiu ekzamenas la manskribojn, neniam povas erari.

La grafologoj jam konas parkere ĉiujn plendojn kaj dirojn kontraŭ si. Tiamaniere, frazoj kiel: "Mia manskribo ŝanĝiĝas de tag' al tago," "Mi povas ŝanĝi mian manskribon kaj vi ne scios tion", aŭ "kiel vi povas fakte vidi iun ajn diferencon inter du similaj manskriboj?" - ne povas zorgigi la grafologon dum lia laboro.

Se iu manskribo ŝanĝiĝas de tag' al tago, tio signifas, ke la homo mem ŝanĝiĝas; ke li ne estas firma, aŭ eble ne maturiĝis ankoraŭ. Kaj se iu homo "maskas" sian propran manskribon, provante plibeligi ĝin, aŭ entute ĝin ŝanĝi - la sperta grafologo tuj notos, ke la manskribo estas falsata.

Eĉ se oni vere provas ŝanĝi sian manskribon, ankoraŭ restas kelkaj bazaj signoj: La rapideco de la skribado, la ritmo, la spaco inter la vortoj kaj la linioj, la baza formo de la literoj, ktp. Ĉiuj tiuj signoj havas grafologian signifon.

Kiel deserton, aŭ dolĉaĵon, mi donos (por la scivolemaj inter la legantoj) kelkajn grafologiajn signojn kaj iliajn signifojn:

La rapideco de la skribo estas tre grava elemento en la grafologio. Se iu skribas rapide, li povas esti vivigojplena, agema, rapidaganta homo kaj ankaŭ kolereza, kortuŝiganta, senpacienca. Se iu skribas malrapide, li estas pli pacienca, silentema, firma, modera kaj ankaŭ povas esti neaktiva, maldiligenta, pasiva, sen decidpovo.

La grandeco de la literoj: grandaj literoj (pli ol 3 mm meza litero) povas esti desegnitaj de fieraj, memfida, varma persono; multfoje artistoj kaj kreivaj personoj skribas per grandaj literoj. De alia flanko ili povas esti facilanimaj, ne kritikemaj, tro memfidaj kaj ne pensantaj antaŭ agado. La malgranda skribo estas de singardemaj kaj paciencaj personoj: Sen iluzioj, praktikaj, modestaj. Sed ankaŭ ili havas la malbonan parton - indiferentaj, timemaj, pasivaj aŭ tro kritikemaj.

Fine, la baza formo de la litero: "ronda" aŭ "akra". Rondajn literojn kutime desegnas bonkoraj fantaziaj kaj amikecaj homoj; sed ili povas esti tro sentemaj, naivaj, ne firmaj personoj. "Akran" manskribon havas "virecaj", firmaj, respondecaj kaj memfidaj homoj. Ofte akra manskribo ankaŭ rilatas al neamikaj kaj "malvarmaj" personoj, kiam la pli ronda manskribo ŝajnas varma kaj amika. Generale, la akra manskribo ankaŭ apartenas al personoj kun granda, forta volo.

Rona Sañar

ANGULO DE J.E.L.I.

Kiel novaĵo kaj bongustaĵo egalas al stultaĵo.

Kverelo komenciĝas, kiam la edzo volis aŭdi la novaĵojn en la radio kaj la edzino volis aŭdi recepton de bongusta manĝaĵo. Jen estas tio, kio aŭdiĝis:

Estas la kvara kaj jen la novaĵoj legataj de... banana glaciaĵo kun nuksoj...

La israela ministro pri eksteraj rilatoj alvenis Usonon por...

batmiksi la dolĉigitan kremon...

poste li renkontiĝos...

kun la diserigitaj migdaloj en la telero...

en la Blanka Domo, celante atingi priteritorian kompromison. Se li ne sukcesos...

tranĉi la bananojn en malgrandajn tranĉaĵojn...

la usona Prezidento povos supozeble...

elverŝi rumon sur la nuksojn...

En Tel Avivo estis hodiaŭ rabo-provo...

kvaron-kilogramo da ĉerizoj...

armitaj provis forte enpenetri...

en la fridan glaciaĵon kaj poste intermiksi la vanilon kun la...

altvaloraj bildoj kaj juveloj. Bonŝance la polico atingis gustatempe kaj la rabistoj estis venigataj...

en la fridujon por profunda frostigo. Eblas ŝpruci sur ilin ĉokoladon...

sed tio povas kaŭzi la ebriiĝon de la ŝoforo kaj sekve la katastrofan renversiĝon de la kamiono, entenanta... kvin porciojn da glaciaĵo. ...

Por la feriantoj: La maro estos kvietaj, sed estas timinde, ke norde estos ondoj...

pli bongustaj. Bonan apetiton!

Eldad Zalcmán

Niaj komencantoj skribasPENSOJ

Kial estas grave memori, kio okazis al la Judoj en Eŭropo dum la dua mondmilito.

Tiu ĉi demando havas multajn respondojn; ĉiu el ili estas sufiĉa kaŭzo por lerni tiun -ĉi malfeliĉan tempon.

Mi volas skribi pri unu kaŭzo. Memori pri tio helpas al ni kompreni nin pli bone. Dum la milito la Judoj vidis kiel kruela povas esti la homo. Ili vidis, kiel kruela la nazioj agis kontraŭ la virinoj, infanoj, maljunuloj kaj ĉiuj sendefendaj homoj. Tio ne daŭris unu semajnon aŭ monaton, sed jarojn. La situacio de la Judoj fariĝis pli kaj pli malbona. En tiu tempo ili perdis la konfidon je la homo. Amikoj fariĝis malamikoj, bonaj najbaroj estiĝis murdistoj. Estas kompreneble, ke en tiuj ĉirkonstancoj la homo perdas la kredon je sia proksimulo.

La manko de kredo restis inter ni ĝis hodiaŭ. Estas tre malfacile kredi unu al la alia. Ni aŭdas, por ekzemplo, la disputon inter ni kaj la Araboj. Ni ne povas kredi, kiam la egipta prezidento diras, ke li volas vivi en paco kun ni. Kiam Sadat estis en Israelo, ni venigis lin al Jad-Vašem (muzeo de la tempo de la katastrofo dum la dua mondmilito) en Jerusalemo. Kial? Sadat certe legis, aŭdis kaj sciis, kio okazis en Eŭropo en tiu tempo. Sed ni volis, ke li komprenu, kiel forta estis la krueleco kontraŭ la Judoj. Ni memoras ĝin ĉiam kaj devas certigi, ke la samo ne revenos.

Ni ne povas kredi aŭ imagi, ke Usono aŭ aliaj nacioj venos helpi al ni kiam ni estos en danĝero. Ni ne povas fidi je iliaj garantioj. Ni fidas nur je nia propra forto. Ĉiu nacio estas okupata pri siaj problemoj, kial do venos fremdaj soldatoj por batali kaj morti por la Judoj?

Ankaŭ mankas al ni la kredo al la homoj ĉirkaŭ ni. Kiam iu promesas ion ni neniam povas esti certaj, ke li plenumos sian promeson. Nia sperto memorigas nin: nenio estas certa. Ĉio povas ŝanĝiĝi rapide. Paco de hodiaŭ eble ne daŭros morgaŭ.

Kiam ni komprenos nin bone, ni scios, ke ni devas refortigi nian kredon, la kredon al la homo. Vivo sen kredo estas malfeliĉa kaj malriĉa. Ni ne devas kredi al ĉio dirita kaj promesita. Ni devas malfermi niajn okulojn kaj vidi ĉiam kio okazas ĉirkaŭ ni. Sed kun iom pli da kredo ni beligos kaj pliriĉigos nian vivon.

I. Zak

KLUBAJ VESPEROJ

- N. Drezner: Kamarada interparolo  
 A. Ron: Kiel kaj kiam venkos Esperanto  
 J. Semer: Enigmaro kaj humuraĵoj  
 E. Haroun: Interamika parolado: FERIAJ TRAVIVAĴOJ  
 J. Giladi: Raporto pri UK. en Varna.  
 M. Ben Porat: Filmo: Travivaĵoj en Esperantujo  
 N. Israeli: Bulgario, la kongreslando  
 H. Maŝler: Genetiko  
 R. Alberg: Lumbildoj de Eŭropo  
 J. Ben Alter: Miaj eldonaĵoj.  
 M. Braña: Muziko kaj amo  
 D. Vunderbaŭm: Ludvespero  
 N. Drezner: Mia vizito ĉe eksterlandaj esp. kluboj  
 A. Ron: Budhismo kaj ĝia influo je la okcidenta filozofio  
 N. Israeli: Sonbendigitaj esp. kantoj  
 J. Giladi: Miaj korespondantoj  
 A. Manor: Golda Meir  
 S. Keren-Or: Sonbendigitaj esp. kantoj  
 H. Maŝler: (kaj aliaj): Anekdotoj  
 M. Landaŭ: J. Korĉak  
 S. Zalmanoviĉi: Kiel progresigi E-on  
 J. Ben Alter: Literatura vespero  
 H. Maŝler: Diskuto pri inflacio

NOVAJ KURSFININTOJ

Ben-David Noga, Benari Sima, Berger Josef, Bistricher Jafa, Bornŝtajn Avraham, Efrati Keren, Ejtan Ĥava, Ejtan Ohad, Gerberoviĉ Mirjam, Segal Ajal, Tjomkin-Ŝami Ĥaja, Zvida Ichak, Margalit Tali, Meiroviĉ Ĥaim, Golan Ichak, Rafael Osnat.

INTERNACIA TELEFONA INTERPAROLO

En decembro 1978, post telefona antaŭanonco la radiostacio de Rimini, Italio, kontaktiĝis telefone kun s-anoj J. Semer kaj d-ro H. Maŝler. Parolis la mondkonata pastro Albino Ciccanti. Interparolo en Esperanto estis disaŭdigata per la radiostacio kun tuja traduko de la pastro. Li volis aŭdi pri la juda festotago Hanuka, kiun Israelo solenis samtempe kun la katolika Kristnaska Festotago. Post la interparolo la pastro diris, ke li kontaktiĝas telefone kun multaj grupoj de E-istoj por montri al la italaj aŭskultantoj, ke E-o povas esti bona internacia interkomunikilo.

La pastro Ciccanti vizitis antaŭ kelkaj jaroj nian klubejon en Tel Avivo dum sia pilgrimvizito en Israelo. Li rakontis tiam pri siaj oftaj kontaktoj kun samideanoj en la tuta mondo. En la lasta jaro li disfamiĝis en Skandinavio, kie li faris longan viziton kun multaj prelegoj en diversaj urboj en Svedio kaj Norvegio. En la urbo Rimini, kie li loĝas, estas, dank' al li, tre vigla E-o movado.

ANONCOJ

1. Posedantoj de kasetoj kun sonbendigita parola (ne muzika!) materialo en E., kiuj bonvolas prunti ilin al blinda s-anino, kontaktu ŝin: Lea Midler, p.k. 23027, Tel Avivo.
2. Novaj prezoj por abonoj kaj jarkotizo de SAT, 1979:
 

Jarkotizo (kun Sennaciulo)	276 IL
Sennaciulo (monata revuo)	200 IL
Sennacieca Revuo (aperas 1 fojon jare)	52 IL
Heroldo de Esperanto (aperas 2 fojojn monate)	280 IL
marpoŝte aŭ 382 IL aerpŝte.	
Literatura Foiro (aperas 6 fojojn jare)	165 IL
Horizonto	157 IL

 Pagon bonvolu sendi al J. Ben Alter p.k. 379, Petañ-Tikva.
3. En Finnlando okazos somere (15-21.6.79) Internacia Kongreso de Fervojistoj. La adreso: Matti Voltti, Untuvaisentie 4 B 64, SF-00820 Helsinki 82.
4. Esperantista Kulturdomo ĉe kastelo Grésillon (49150 Baugé, Francio) sciigas pri kulturaj aranĝoj por E-istoj okazontaj dum la monatoj aprilo, julio, kaj aŭgusto 1979. En la programo: kursoj por diversniveloj, artaj aranĝoj, ekskursoj, prelegoj ktp. Rekomendinda por ĉiuj, speciale por partoprenantoj de la Universala Kongreso okazonta somere en Svislando!
5. "Muzika kulturo" (Centro de Documentazione Esperantista, Via dei Sabelli, 5400185 Roma, Italio) estas eldonejo de muzikaĵoj (diskoj, kasedoj ktp.) en E. serĉanta kunlaboron de ĉiuj e-istoj, kiuj kutimas kanti, ludi muzikilojn, traduki kanzonojn aŭ simple aŭskulti ilin. S-anoj, kiuj kapablas pere de radio-stacioj aŭ alimaniere prezenti tiujn-ĉi muzikaĵojn al neesperantistoj, estas bonvenaj ankaŭ. Krome mendebla estas kasedo entenanta 21 prisociajn kanzonojn. La prezo, pagota post ricevo de la kasedo kaj de tekstlibreto, estas 3000 italaj liroj (ĉirkaŭ 70 IL).
6. Ĉu vi skribas poemojn en E-o? "Nokto", e-a poemkolekto eldonata en Japanio, atendas viajn poemojn. Sendu al: Poemo Esperanto, FUZIMI-CYO 5-26, KAKO NOBUKOKATA, HIROSAKI-SI, AOMORI-KEN, 036 JAPANIO.
7. LA UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO okazos ĉi-jare en Lucerno, Svislando, de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto. Aligu frue!

RAPORTAS s-ano J. Murĵan

Mi gvidas rondon de mezlernejaj gelernantoj en la Junulara Centro en Tel Avivo. La kurso okazas dank' al iniciato de la direkto de la Centro okazigi la devigajn rondojn de kelkaj mezlernejoj en la kadro de la agado de la Domo. Inter la dek durondoj estas ankaŭ E. kurso, al kiu aliĝis (en la unua eksperimenta stadio) 11 gelernantoj. Verŝajne okazos plia rondo. La kurso estas gvidata laŭ nova nun prilaborata metodo sugestita de s-ano J. Kohen-Cedek de Jerusalemo.

VOLAS KORESPONDI

S-ro Abbas Shareghi Arani, KH. Dampezeshki, Kouche Khosravi, Kouche Cheisari N-o 1, Teheran, Iran: Bahaano, interesiĝas pri aktiveco de israelaj esperantistoj.

S-ro Eugen Matirko, Orlia 4/I, 040 00 Košice, Ĉeĥoslovakio: volas interŝanĝi librojn, gazetojn, diskojn, p.m., insignojn ktp.

S-ro Ch. Hochausser-Armony, p.k. 5171, Ĥajfa, Israelo, dez. kor. kun s-anoj de diversaj landoj.

Beate Jagota, Auenstr. 26, 701 Leipzig, DDR (Orienta Germanio): 36-jara, laboras en libroeldonejo.

F-ino Gita Szilágyi, Izsáki U 5, 6000 Kecskemét, Hungario: 27-jara, laboras en hospitalo (foto ĉe la redakcio).

Tomasz Mańkowski, ul. Armii Czerwonej 11., PL 81-849 Polska, Sopot: 19-jara pola junulo, mezlernejano. Kolektas bildkartojn, interesiĝas pri sporto, fremdaj lingvoj kaj pri interesaj travivaĵoj. Ne gravas aĝo.

S-ino Gudrun Hansen, Slogsherredsvej 13, Bylderup-Bov, Danlando, kaj 5 lernantinoj 16-18 jaraj.

Andrzej Kosiński, ul. Sieniawska 17/13, PL-68-200 Żary Polska, Pollando, 28-jara edziĝinta radioteknikisto.

JARKOTIZO POR E.L.I.

Ĉiuj samideanoj estas petataj pagi la jarkotizon por la jaro 1979 (100 IL.) uzante la aldonitan al la bul-teno poŝtpagilon.

koran antaŭdankon,  
E.L.I.

AL LA KUNLABORANTOJ DE I.E.

La Redakcio de I.E. petas, ke la artikoloj sendotaj al la redakcio estu skribitaj kun duobla spaco inter la linioj.

Ni antaŭdankas!